Sci. Rev. 48 (1997)(2)

# Ĥoralpreludo de G. J. Rheinberger retrovita

F. G. RÖSSLER (DE)

## 1. La komponisto

*Gabriel Josef Rheinberger* naskiĝis kiel filo de duka impostisto en la jaro 1839 en Liĥtenŝtejno, malgranda ŝtato inter Aŭstrujo kaj Svislando. Jam frue evidentiĝis lia talento por la muziko. Sepjaraĝa li fariĝis orgenisto en sia naskiĝurbo Vaduzo. La patro ebligis tion per disponigo de dua piedklavaro, kiun oni fiksis super la origina, por ke la mallongkrurulo povu atingi ankau la pedalojn. La orgeno jam antaŭe havis rilaton al la vivo de *Rheinberger*: lia patro vote estis donacinta ĝin al la preĝejo, post kiam lia edzino naskis sana la knabon Jozefo malgraŭ danĝera falego dum la gravideco.

Tamen la patro komence ne tre vole subtenis la muzikajn aspirojn de lia filo, sed, cedante la konsilojn de fakuloj, fine permesis, ke la knabo en la pli granda urbo *Feldkirch* serioze eklernu la muzikistan medion kaj - en la jaro 1851 - fariĝu muzikstudento en Munkeno, la urbo, kiu poste fariĝis lia daŭra vivocentro. Post brilaj ekzamenoj *Rheinberger* tie ekprofesiis kiel muzikinstruisto kaj orgenisto, poste li deĵoris kiel profesoro ĉe la Reĝa Muziklernejo. Foje li prizorgis ankaŭ aliajn taskojn, ekzemple ĉe la teatro, ĉe korusoj ktp. Lia vivo sufiĉe regule organiziĝis. Malfrue li edziĝis al klera, artema virino. Infanojn ili ne havis.

Kiel instruisto kaj komponisto li akiris renomon ĝis Usono. Orĥestroj kaj korusoj mendis pecojn ĉe li, eldonejoj aĉetis kaj publikigis liajn verkojn. En preskaŭ ĉiu ĝenro li verkis. Aparte li flegis la religian kaj la profanan ĥormuzikon, pianomuzikon kaj koncertan muzikon por la orgeno; ĉie li montris elstaran talenton por la kontrapunkta ellaborado. Multaj distingoj honoris lin. En siaj lastaj vivojaroj li ne plu apartenis al la aktuala muzika evoluo. La novaj stiloj estis preteririntaj lin. Konscie pri tio li tamen ne ŝanĝis sian personan tonon. Li mortis iom rezignacie en la jaro 1901.





Sci. Rev. 48 (1997)(2)

*Rheinberger* fakte ne apartenas al la komponistoj, kiuj formis aŭ influis la muzikestetikon de ilia jarcento. Sed li verkis talente, sincere, teknike neriproĉeble, kontribuis grave al la loka kaj la germana muzikaj vivoj. Li ĉie estis agnoskata kiel homo kaj arte kaj personece nobla kaj respektinda.

La muzika publiko tamen baldaŭ forgesis lin; tute aliaj estetikaj kaj teknikaj konceptoj furoris. Lia nomo per porpreĝejaj komponaĵoj iel transvivis, sed la impulsoj al vera renesanco nur en la 60aj jaroj de la 20a jarcento komencis efiki. *Harald Wanger*, memdona direktoro de la "*Rheinberger*-Instituto" en Liĥtenŝtejno, multon verkis pri sia samlandano, altiris kunlaborantajn sciencistojn kaj eldonistojn. Intertempe ankaŭ la ĝeneralaj cirkonstancoj estis fariĝintaj favoraj: la muzikema publiko atendis novaĵojn el diversaj tempoj, neaŭditaĵojn ankaŭ el la ĝis nelonge antaŭe malŝatita romantika epoko. Post longtempa neglektado, suspektado, eĉ misfamigado la muziko de *Rheinberger* denove povis pruvi siajn kvalitojn. [1]

*Rheinberger* denove apartenas al la "aktualaj" komponistoj; eldoniĝis intertempe multaj verkoj diske kaj kompaktdiske. Senrezerve liaj muzikaĵoj daŭre aperas en koncerto- kaj radioprogramoj. [2]

## 2. La novaj publikigaĵoj pri *Rheinberger*

Ekde la 60aj jaroj la muziko de *Rheinberger* denove disvastiĝis en la publiko. Ĉiam pli eldonejoj represis aŭ en nova kompostado publikigis liajn muziknotojn. La Princa Registaro de Liĥtenŝtejno subvenciadas la eldonon de la Kompleta Verkaro. Jam granda parto de la verko estas havebla diske kaj kompaktdiske. La *Rheinberger*-

---

[1] La aŭtoro memoras la tempon, kiam li, studante la orgenoludon, prezentis siajn pene eltrovitajn *Rheinberger*-kopiaĵojn en la Dioceza Muziklernejo en *Speyer*. Tiutempe la instruistoj demandis lin pri la komponisto kaj la deveno de la pecoj. Ili tiam havis nur svagan imagon, montris antaŭjuĝojn. Nuntempe ili mem ludas kaj ludigas, kantigas *Rheinberger*-komponaĵojn: orgenopecojn kaj mesojn.

[2] Ĝoje la aŭtoro konstatas, ke lia nomo foje aperas apud tiu de *Rheinberger* en programoj kaj muziknotaj eldonaĵoj - eĉ se nur pro la alfabeta ordo...

Instituto presigis en multvoluma eldono liajn leterojn, same kiel aliajn primaran kaj sekundaran literaturaĵojn. Certa kulmino de la *Rheinberger*-renesanco estis la festado de lia naskiĝo antaŭ 150 jaroj en 1989 kun impona katalogo de *Harald Wanger.* [3]

Krom multaj aliaj publikigaĵoj la plej gravaj aktualaj referencaj verkoj pri la *Rheinberger*-aj komponaĵoj, rilatantaj precipe al la orgenomuziko, temo de tiu ĉi laboraĵo, devenas de

1) *Hans-Josef Irmen: "Thematisches Verzeichnis der musikalischen Werke Gabriel Josef Rheinbergers"* (Laŭtema indekso de la muzikaj verkoj de G.J.Rh.), (*Bosse*-eldonejo, Regensburgo 1974) kun jena diferencigo de la verkoj:
   A) kun verkonombroj (op.1 - 197),
   B) sen verkonombroj (WoO 1 - 100) kaj
   C) "*Jugendwerkverzeichnis*" (JWE 1 - 171) (Indekso de la junuljaraj verkoj);
2) *Martin Weyer: "Die Orgelwerke Josef Rheinbergers".* (La orgenoverkoj de *Josef Rheinberger* / Eldonejo *Florian Noetzel, Wilhelmshaven* 1994).

3. Retrovita orgenokajero kun pecoj de *Rheinberger*

Ambaŭ supre menciitaj verkintoj ja diligente esploris la aperintajn, la manuskriptajn kaj la eble iel privatajn pecojn, sed ili nature ne povis sukcesi trovi ĉiujn iam ajn aperintajn komponaĵojn de la komponisto. *Rheinberger* ne malofte kompleze plenumis komponopetojn. Tiuj pecoj aperis (plej ofte) en orgenokajeroj, kie oni enrangigis lin titole ekzemple inter "la plej elstarajn orgenokomponistojn de iam kaj nun" aŭ inter "la nuntempajn majstrojn de la kompona arto". Sed la komponisto mem forgesis aŭ neglektis noti la pecojn en sian verkoliston. Pro tio la aŭtoro povas raporti pri la trovado de ĝis nun nekonata orgenopeco de

[3] La aŭtoro kontribuis al la rediskonigo de la verkoj de *Rheinberger* ne nur per multaj koncertoj, sed ankaŭ per deko da gazetartikoloj (ankaŭ en Esperanto) kaj per la germanlingva studaĵo *"Die ostinaten Werke Gabriel Josef Rheinbergers".* (La obstinaj komponaĵoj de *Gabriel Josef Rheinberger* / Eldonejo *Anton Böhm, Augsburg* 1994).



*Rheinberger.* Kadre de daŭra esplorado li trovis en la jaro 1985 en la Landa Biblioteko de Rejnlando-Palatinato en *Speyer* orgenokajeron, en kiu troviĝis tri komponaĵoj de *Gabriel Josef Rheinberger.* Du el ili jam estas registritaj en la katalogo de *Irmen* (en la grupo WoO). Sed unu ne menciiĝas tie ĉi kaj ankaŭ ne en la (du jarcentojn pli posta) verko de *Weyer* (1994), kvankam ja temas pri orgenopeco. La titolo de la kajero estas:

> *"Originalkompositionen zumeist zeitgenössischer Meister der Tonsetz-Kunst für Orgel oder Harmonium.*
> *Zum kirchlichen Gebrauch sowohl wie zum Studium & zur Übung herausgegeben von Johann Paul Schuhmacher.*
> *Josef Roth'sche Verlagshandlung, Schwäbisch Gmünd".*
> *(Keine Jahresangabe).*

(Originalaj komponaĵoj de plejparte aktualaj majstroj de la kompona arto por orgeno aŭ harmoniumo.
Por preĝeja uzo same kiel por studado kaj ekzercado eldonita de *Johann Paul Schuhmacher.*
Publikigis *Josef Roth* en *Schwäbisch Gmünd*). (Jaro ne indikita).

La paĝoj estas bone konservitaj, sed kelkarande iom difektitaj. La Palatina Landa Biblioteko firme rebindigis la kajeron en 1984, iam ricevitan flanke de la biblioteko de la "Instituto de la malriĉaj lernejo-fratulinoj *Speyer*". Ĝi estas prunte prenebla sub la numero Mus. 13269. En la kajero kolektiĝas komponistoj el la dua parto de la deknaŭa jarcento, preskaŭ ĉiu - krom *Rheinberger* - nuntempe tute forgesita. [4]

Ili ĉiuj apartenas pli aŭ malpli al la grupo de la "Romantikaj klasikuloj", kiuj ne - kiel la antagonista komponistaro ("La nova Germana skolo" kun *F. Liszt* kaj *R. Wagner* ĉekape) - intencis skribi "estontecan" muzikon, sed klopodis pluevoluigi ĝin surbaze de la pasinttempaj atingoj. Ĉie vidiĝas retroligiemo kaj klasikeco, almenaŭ forme. Tiuj formoj devenas el diversaj epokoj, plej ofte el la baroko,

[4] Inter aliaj: *R. Succo, P. Janssen, P. Piel, F. Krauss, M. Horn, Th. Forchhammer, R. Radecke, G. Linder, G. Jensen, J.G. Herzog* (profesoro de *Rheinberger*), *J.G.E. Stehle, R. Bibl.*

nome tiuj de koralpreludo, kanono (ofte modele laŭ samaspecaj koralpreludoj de *J. S. Bach*), preludo, fugo, postludo kaj karaktera peco. Ne malofte la harmonio multe transiras la barokajn modelojn kaj utiligas la progresintajn romantikajn harmoniajn eltrovaĵojn.


4. La retrovita orgenopeco

La retrovita peco bone koincidas kun la forma kaj estetika gvidlinio de la kajero (se tia fakte ekzistis kaj ne estas hazarda), kvankam ne plu estas eble esplori, ĉu la muzikaĵo estis mendata laŭ kohera koncepto aŭ sendata de la komponisto laŭ la propra gusto. Ankaŭ la kajera titolo "Originalaj komponaĵoj" ne multon esprimas. La titolo de la *Rheinberger*-a komponaĵo estas *"Vorspiel"* (Antaŭludo) kaj evitas la pli pompan, fakan esprimon "*Choralpraeludium*" (Ĥoralpreludo). La prezentado de simpla germanalingva titolo iom prilumas la malorgojlan, modestan personecon de la komponisto.

Fakte la verketo baziĝas sur ĥoralo. Tradicie orgenistoj kaj komponistoj utiligadis per ornama aŭ karaktera interpretado la melodiojn de koraloj por antaŭlude prepari la partumantojn de diservoj al la kantado. Pli poste tiun ĉi ĝenron oni prezentis ankaŭ kiel artoverkon en koncertoj. Sed la melodio de la *Rheinberger*-a "Antaŭludo" ne devenas de konata ĥoralo. Kvankam ĝi ja aŭdigas sin kvazaŭ konata, tamen tre akurata serĉado ne povis spuri iam ekzistantan ĥoralon kiel originalon. Propra kono, traserĉado de referencaj verkoj, esploroj en la loĝ- kaj naskiĝregionoj de *Rheinberger* kaj ankaŭ la pridemandado de himnologoj ne povis certigi la devenon de tiu ĉi melodio. Estas plej versajne, ke la komponisto artece kreis la teman linion mem por plej taŭge utiligi ĝin en kanona maniero. [5]

[5] *Rheinberger* elstare majstris la "rigorajn formojn" de la komponado kiel kanono, fugo kaj ĉakono, ne nur en siaj orgenoverkoj (kp. i.a. la kajeron "12 karakteraj pecoj en kanona formo por piano" op.180 aŭ la kanonon *"Quam olim Abrahae"* en lia "Rekviemo" op. 60).





Tamen ĝi nekontesteble similas al jam de longe tradiciaj modeloj, ekzemple al la vaste konata Kristnaska kanto "*Vom Himmel hoch, da komm ich her*" (El la alta ĉielo mi venas), teksto de *Martin Luther*, 1535).

5. Analizo

La peco ampleksas aŭ 19 taktojn (se oni toleras la tro longan tutan noton en la lasta takto) aŭ 20 taktojn (se oni aldonas taktduonan paŭzon en la unuan takton). Ĝia tonalo estas D be maĵora (sufiĉe nekutima por ordinara orgenisto tiutempe, eble eĉ nuntempe), la taktounuo ampleksas du duonojn. La tema linio en la soprano estas dividita en kvar partojn, ĉiam - krom la lastaj du - dividita per paŭzoj. Jen la ĥoralo reduktita al sia kerno, kompare kune kun *"Vom Himmel hoch"*:

a) la *Rheinberger*-a ĥoralmelodio:



b) *"Vom Himmel hoch"* -melodio:




En la retrovita "Antaŭludo" la soprano komenciĝas. Post tri taktoj la baso imitas ĝin akurate du oktavojn pli malalte en kanona maniero. Iometaj ŝanĝoj okazas nur ĉefine. La du mezaj voĉoj akompanas



libere kaj - per kolorigado de la baza tonalo - difinas la romantikajn harmoniajn apartaĵojn. Foje okazas sinkopoj kaj similaj ligaĵoj en tiuj ambaŭ voĉoj, kion poste, en la kvara segmento, la soprano transprenas (vd. la originalon). Mankas la kanona imitado de la kvara melodiparto per la baso. Anstataŭe ĝi interplektiĝas kontrapunkte kun la soprano, tiel densigante la strukturon ĉefine.

La kanona strukturo (reduktita al ĝiaj bazaj elementoj):



Laŭ la harmonio la peco estas bone identigebla kiel *Rheinberger*a kaj tiutempa. Ofte troviĝas la "romantikaj" mediantoj (terca parenceco) kaj septakordoj, foje interligitaj (ekz. en takto 6: B be minora 7; takto 16: B be minora 7; takto 17: G be maĵora 7). La finaĵo en la du lastaj taktoj finas ne per simpla tradicia intersekvo de la harmoniaj ŝtupoj dominanto - toniko (V - I), sed per fajna diferencigo en la antaŭlasta takto: dufoje dominanto kun kromtonoj (kvarto respektive sekundo), ĝis en la tria bato aperas la ordinara dominanta septakordo. Sed ĝi ne finas, sed transformiĝas en la mildan minoran trian ŝtupon, poste en la unuan, sed ne jam finaforme, sed kun baso pli alte, mezaakorde (kvar-ses-akordo). Tra tiuj transirigoj fine la lasta takto trovas la finon en la baza tonalo - tipe romantika etendado de la harmoniaj rilatoj.

6. Resumo

La retrovita orgenopeco de *Rheinberger* malgraŭ sia mallongeco interese kompletigas la verkaron de la komponisto, kiu ja multajn verkojn skribis por sia propra instrumento orgeno, inter alie 20 orgenosonatojn kaj du orgenokoncertojn, sed , apud la retrovita (kiel montrite plej verŝajne propratema), prilaboris nur unu plian ĥoralon, nome (en du ellaborŝtupoj) la faman *"O Haupt voll Blut und Wunden"* (Ho kapo sanga, vunda), WoO 25,9 kaj op. 162,6, tamen tie titolita nur *"Largo espressivo"*). Liaj protestantaj kolegoj ja ofte uzis la antaŭludan formon pro emo kaj bezono en la protestanta diservo. Sed *Rheinberger*, katoliko, ne sentis bezonon de ĥoralpreludoj dum latinaj mesoj (kies tekstojn li ofte komponis) kaj ne emon, kvankam li ja estis studanta ĉe protestanta korifeo, *J. G. Herzog*. Li fakte neglektis tiun ĉi ĝenron.

Pro tio (kaj ne nur je la bedaŭro de la orgenistoj kaj de la *Rheinberger*-ografoj) nur tiuj ĉi du antaŭludaj pecoj por orgeno ekzistas, la unua "oficiala" kun sia antaŭŝtupo, registritaj en la verkoindekso, la dua, nun denove publike konata, post ties trovado en la Palatina Landa Biblioteko. Estas malverŝajne, ke plia ĥoralpreludo de *Rheinberger* reaperos post centjara dormado.

Adreso de la autoro:
Franz-Georg RÖSSLER
Am Mönchsbusch 6
DE 67373 Dudenhofen
GERMANIO



## *CHORALPRÄLUDIUM VON G. J. RHEINBERGER WIEDERGEFUNDEN*

*Franz-Georg RÖSSLER (DE)*

*1. Der Komponist*

*Gabriel Josef Rheinberger wurde im Jahr 1839 als Sohn des fürstlichen Rentmeisters (Steuereinnehmer) in Liechtenstein geboren. Schon früh zeigte sich sein Talent für Musik. Siebenjährig wurde er Organist in seiner Geburtsstadt Vaduz. Der Vater hatte dies mit einem zweiten Pedalklavier ermöglicht, das über dem ersten angebracht wurde, damit der Junge mit seinen kurzen Beinen auch die Pedaltöne erreichen konnte. Diese Orgel hatte bereits zuvor einen Bezug zu Rheinbergers Leben. Der Vater hatte sie aufgrund eines Gelöbnises der Kirche gestiftet, nachdem seine Frau den Jungen trotz eines schweren Sturzes gesund zur Welt gebracht hatte.*

*Dennoch unterstützte der Vater anfangs nur ungern die musikalischen Beschäftigungen des Sohnes, erlaubte allerdings nach dem Zuraten von Leuten vom Fach die Aufnahme einer ernsthaften musikalischen Lehre in der Stadt Feldkirch. 1851 begann Rheinberger ein Musikstudium in München, der Stadt, die später sein Lebenszentrum werden sollte. Nach ausgezeichneten Examina wurde Rheinberger dort Musiklehrer und Organist, später Professor an der Königlichen Musikschule. Zeitweise übernahm er auch Aufgaben am Theater und leitete Chöre. Sein Leben organisierte er nach strengen Prinzipien. Erst spät heiratete er eine gebildete, kunstsinnige Frau; Kinder hatte er nicht.*

*Als Lehrer und Komponist erwarb er sich Ansehen bis in die USA. Orchester und Chöre bestellten Werke bei ihm, Verlage kauften seine Stücke an und veröffentlichten sie. Er arbeitete in fast allen musikalischen Genres. Besonders pflegte er die geistliche und weltliche Chormusik, die Klaviermusik und die konzertante Musik für Orgel; durchgehend zeigte sich sein Talent für kontrapunktische Ausarbeitung. Er erhielt viele Ehrungen und Auszeichnungen. In seinen letzten Lebensjahren gehörte er allerdings nicht*